# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

Caixa Postal 04-0406
70000 Brasília DF

JUN/JUL/AŬG/OKT 81



24 X '81 BRASIL CORREIO Cr$ 6,00 M 50236

JOSÉ CARLOS DORINI RAMOS
SHIN - QI 2 - Conjunto 8 - Casa 15
Lago Norte
71500 - Brasília - DF


*R E A P E R A S nia "Tagiĝo" post la brilaj tagoj de la 66a Universala Kongreso de Esperanto en Brazilio. Ni ne deziras tro amplekse komentarii tiun eventon, ĉar ni supozas, ke la plimulto de niaj legantoj persone ĉeestis kaj spertis tiun unikan etoson. Tamen, la malmultajn, kiuj ne ĉeestis, ni informas ke 1750 gekongresanoj el 50 landoj (930 brazilanoj !) travivis en nia urbo la plej grandan kongreson ĝis nun organizitan de UEA ekster la eŭropa kontinentoj! Tiuj "furoraj" sep tagoj longe restos en la memoro de la partoprenintoj kaj nia asocio estas fiera pro la sukceso kaj danka al ĉiuj brazilaj esperantistoj de nia lando, kiuj kontribuis al realiĝo de tiu historia kongreso en Brazilo. Kaj nun ? Ek al laboro por profiti la favoran eĥon de tiu manifestacio en nia urbo.*

La rektoro de la Internacia Kongresa Universitato, Prof-ro Paulo Vieira raportis, ke la reago pri nia kongreso en la universitataj medioj estis tre pozitiva. Unu el tiuj universitato sendis observanton al la kongreso kaj pluraj aliaj institutoj esprimis per letero sian favoran sintenon pri la perspektivo uzi la Internacian Lingvon kiel ponton inter la diversaj kulturoj. Prof-ro Paulo Vieira persone instruos la lingvon al grupo de parlamentaj asesoroj kaj li havas an kaŭ konkretajn planojn por enkonduki la instruadon de Esperanto en la fakultato pri komunikado de la Universitato de Brazilio - UnB - UnB - UnB

## NOVAJ ESPERANTO-KURSOJ EN BRAZILIO

Dum kaj post la kongreso, la telefono de nia sidejo seninterrompe sonoris. Temis pri personoj, kiuj deziras lerni la Internacian Lingvon. Por tuj kontentigi tiun deziron, nia asocio lanĉis publikan kurson de Esperanto al kiu niaj membroj sendis ankaŭ parencojn, amikojn, konatojn kaj nekonatojn, kiuj estis kaptitaj de entuziasmo pri nia afero:

- La kurso funkcias ĉe Colégio Compacto (L-2/Sul Quadra 601)
- Dato: 15/09 ĝis 15/12/81
- Tagoj de la semajno: Mardo kaj Ĵaŭdo (20:00/21:30 h)
- Profesoro: Nelson Pereira de Souza

Flustre: Tiuj gelernantoj estas tre lertaj kaj scivolemaj ! Ni antaŭvidas ke baldaŭ kelkaj inter ili estos tre kapablaj esperantistoj...

UNU EL LA TUJAJ POZITIVAJ REZULTOJ DE la Kongreso, estis la decido de SENAC/DF enkonduki daŭrajn kursojn de Esperanto, kiel komplementa lernobjekto de tiu instituto. La unua el tiuj kursoj baldaŭ komenciĝos.

La interesitoj bonvolu sinturni rekte ĉe la Direkcio de SENAC/DF (SEP 703 - Lote A - Telefone: 225-6855).

## CEUB CEUB CEUB CEUB CEUB CEUB

Prof-ro Nelson ankaŭ daŭrigas la Esperanto-kursojn ĉe CEUB. En la sama ĉambro 333 (Bloco 3), kun pli ol 50 gelernantoj, aktive marŝas la instruado de la Internacia Lingvo en nia urbo:

Kurso A - Lundo/Ĵaŭdo (18:30-19:20 h)

Kurso B - Mardo/Vendredo (18:30-19:20 h)

NATAL NATAL NATAL - nord-orienta urbo de ŝtato Rio Grande do Norte atendas vin de la 28-a ĝis 31-a de januaro 82 okaze de la IV BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARO KONGRESO. TUJ ALIĜU !

Kotizoj: ĝis 30 Nov 81 = 500,00
ĝis 31 Jan 82 = 900,00

INFORMOJ


BEJO - Cx. Postal 11-1110 - 70000 Brasília DF

AURELIANO CHAVES, nuntempe, Prezidento de la Federacia Respubliko Brazilo:

"Unue, mi bedaŭras, ke mi ne parolas al la gekongresanoj per la lingvo konvena al tiu ĉi Kongreso - Esperanto... Tamen, tio ne malgrandigas la entuziasmon, kiun mi sentas por lingvo, kiu - prezentante sin politike sen armiloj kaj ekonomie sen postuloj - okupos, pli aŭ malpli frue, sian pozicion kiel universala lingvo".

Jen parto de "unu el la plej belaj elpaŝoj de kongreslanda dignulo en niaj Kongresoj, 'neatendite politika', klara kaj aŭdaca", okaze de la Solena Inaŭguro de la 66a UK, dimanĉon, la 26-an de julio pasinta, ĉe la plenario de la Ĉambro de la Deputitoj.

Nepre legu kompletan raporton de la 66a UK en la revuo Esperanto - sep 81.



Du eminentaj rolantoj en la 66a UK, kiu donas novajn dimensiojn al la tutmondeco de Esperanto: José Lins Albuquerque (maldekstre), prezidanto de LKK, kaj d-ro Aureliano Chaves, vicprezidento de Brazilo. rev. Esperanto

O SR. PRESIDENTE (FREITAS NOBRE) - "Passa-se à parte da sessão destinada a homenagear a memória de Lázaro Luiz Zamenhof, criador do Esperanto".

Pere de tiuj enkondukaj vortoj, je la 28-a de septembro pasinta, la Ĉambro de la Deputitoj omaĝis Zamenhof-n, kiam la Deputitoj entuziasme longe parolis pri la evidenta efiko, valoro kaj taŭgeco de la Internacia Lingvo kadre de la hodiaŭa socio.

La Deputito VASCO NETO - kiu proponis tiun solenan omaĝon - parolis dum pli ol duonhoro, reliefigante la avangardan uzon de Esperanto en kelkaj landoj, nome:

*"Milhões de pessoas dos mais diversos povos do Planeta utilizam hoje o Esperanto como língua auxiliar. Grande é a sua divulgação nos países europeus e do Oriente. Na China, já foi oficializado e em Esperanto são publicados diversos documentos do governo. No bloco socialista, é utilizado em programas domésticos de rádio e televisão. Na Europa, a propaganda turística já é impressa em Esperanto e os grandes grupos estatais e privados adotam o Esperanto em seus documentos, como o caso da Fiat, Swissair, KLM, a Philips dos Estados Unidos, a NASA também já publica trabalhos em Esperanto e, aqui no Brasil, inúmeras são as obras em Esperanto publicadas pela Federação Espírita Brasileira que estão sendo vertidas para o chinês e o japonês."*

La Deputitoj FREITAS NOBRE, ANTÔNIO MORAIS, MANOEL ARRUDA, ankaŭ prelegis pri la sama temo. Se vi volas kompletan raporton de tiu solenaĵo, vidu Gazeton de Federacia Parlamento, de 25 sep 81.

BRAZILANOJ SERĈATAJ !

Sur la ondo de la 66a UK, alvenis al nia redakcio pluraj korespond-petoj:

POLLANDO: Marek Lachowski - str. J. Dlugoszo 22/19 - PL 01 174 Warszawa (25 jara junulo, kiu interesiĝas pri sporto, muziko, kino kaj fremdaj lingvoj).

Roman Majewski - Zeromin- PL 97 315 Tuszyn (19 jara junulo, studento, kiu interesiĝas pri sporto kaj geografio).

Wieslaw Slawskowski - ul. Stawowa 49/40 - PL 85 323 Bydgoszcz .

BULGARIO : Daniela Kirova - M. Pantaleev 5 - Sofia 18 (oficistino, 36 jara, nova esperantistino).

Ili atendas viajn l e t e r o j n . . .

IV BEJK
APOGU BEJO-n
IV BEJK
APOGU BEJO-n
IV BEJK
APOGU BEJO-n

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO KONGRESOS

en la famkonata industria urbo de la lando (SÃO PAULO), de la 31 okt ĝis 1-a nov 81.
La ĉefa celo de tiu kongreso estas diskuti la statuton de BKE, voĉdoni la novan estraron - kaj ankaŭ - kompreneble, oni prelegos pri Esperanto.